# Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

JARKOLEKTO
JAAR-GANG 4 N° 6 OKT. 1984

## ATENTINDAĴOJ

Venonta estrarkunsido de FEL : sabaton 3-a de novembro ekde 10.00 h. en DE PINTE okaze de la

FLEJA-JEB SEMAJNFINO, okazonta de 02 ĝis 04 11 1984
Info : Ilse JACQUES, Molenstrato 29
2018 ANTWERPEN

19-a MARKOLA KONGRESO de 19 ĝis 21 04 1985
Info : Roland ROTSAERT, Visspaanstrato 97
8000 BRUGGE

## S E R Ĉ A T A (J)

Organizonto(j)n de onta(j) Flandra(j) Kongreso(j); la unua venonta en 1986.
Kandidatoj sin anoncu ĉe la sekretario aŭ ĉe iu el la estraranoj.

I N F O R M I L O . Kadrogazeto de FLANDRA ESPERANTOLIGO
Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN
Telefono 03/234 34 00

Jarabono : BF 150,- Kontoj : 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43

---

| | | |
|---|---|---|
| Prezidanto : | Ivo DURWAEL, Paul Gilsonlaan 5<br>2520 EDEGEM | 03/440 30 92 |
| Sekretario : | Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14<br>2510 MORTSEL | 03/449 50 06 |
| Financoj : | Erik D'HONDT, Wilgstraat 25 A<br>9440 EREMBODEGEM | 053/77 44 97 |
| | Paul PEERAERTS, Baron Dhanislaan 13<br>2000 ANTWERPEN | |
| Informado : | Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 62 66 |
| Intergrupa agado : | Hilde VAN INGELGEM, Arbeidstraat 21<br>9300 AALST | 053/70 50 11 |
| | Trees DOOMS, Baron Dhanislaan 13<br>2000 ANTWERPEN | |
| Junularo : | Kristin TYTGAT, St. Hathebrandstraat 8<br>2510 MORTSEL | 03/449 50 24 |
| Kadrokursoj : | André STAES, Jan Denucéstraat 1/198<br>2020 ANTWERPEN | |
| Literaturo/eldonoj | Christian DECLERCK, Amerikalei 135/2<br>2000 ANTWERPEN | |
| Gazetara servo : | Herman k. Annie DECEUNINCK-BOLLAERT<br>Lusthuizenlaan 1 b. 4, 1500 HALLE | 02/360 17 22 |
| Sciencoj : | Wim DE SMET, Hertendreef 12<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 99 49 |

Provincaj respondeculoj :

| | | |
|---|---|---|
| Brabanto : | M. Th. HENQUINEZ<br>Lipsestraat 166, 2991 TILDONK | 016/23 61 90 |
| Limburgo : | Guido SCHROEYERS<br>Helzoldstraat 113, 3558 HELCHTEREN | 011/53 64 10 |
| Okc. Flandrujo : | vakas | |

---



# P R O T O K O L O

PRI LA ESTRARKUNSIDO DE SABATO 6-A DE OKTOBRO 1984 EN ESPERANTODOMO ANTVERPENO.

---

Ĉeestas : Erik D'Hondt (ED), Trees Dooms (TD), Ivo Durwael (ID) Paul Peeraerts (PP) André Staes (AS), Ite Tytgat (IT), Hilde Van Ingelgem (HVI) kaj Jan Bovendeerd (JB)

Petis senkulpigon : Edward Symoens (ES) kaj Jules Verstraeten (JV)

Komenco : 10.15 h.

## T A G O R D O

### 1. E N K E T O

1.1. AS legis la broŝuron "Sociologia Esploro de Sintenoj al Esperanto" kaj trovis du ĉefajn temojn, kiuj povus esti interesaj por la kadrokursoj. Li i.a. proponas organizi kadrokursojn pri :
- komunikado
- varbado.

1.2. ID sin demandas ĉu la planita enketo (en Aalst) vere meritas la energion, ĉar ja enketoj estas fakte ne pli ol ideoformaj. Ĉu ne estus pli bone agi laŭ konataj rezultatoj de jam okazintaj enketoj, anstataŭ refari saman tempo- kaj fortoraban laboron.

La ceteraj estraranoj samopinias.

1.3. Jen pli konkrete la ideoj de AS.

Kadrokursoj

Montriĝas ke ĉiujare multe da membroj eksiĝas kaj aliaj aniĝas. Laŭ la hipotezo de pola sociologo Leyk, ekzistas iu plafono rilate membrecon en ĉiu lando depende de la populacio. Krome en iu lando mem foje iu klubo malaperas kaj alia stariĝas. La Esperanto-movado konformiĝas al la evolutendencoj de aliaj asocioj. Homoj elektas por iu specifa okupiĝo kaj elektoeblecoj estas multnombraj.

Tamen oni povas sin demandi kial precize homoj forlasas la movadon aŭ ne plu volas membriĝi en Esperanto-asocio, kvankam ili iam tion faris. En Ĉekoslovakio oni pristudis tiun problemon. Sociologo Krimsky pere de enketo analizis tion. Li distingis la enketitan populacion en diversajn grupojn : I = eksmembroj kaj II = membroj.

Unue oni demandis, kion kontribuas Esperanto al iu ? La rezultoj kalkuliĝas en procentoj

| | I | II |
|---|---|---|
| okupo | 0,4 | 0,6 |
| societaj renkontiĝoj | 8 | 16 |
| rilatoj kun eksterlando | 28,7 | 36,5 |
| kulturi hobion | 8 | 14,9 |
| ŝatokupo per si mem | 35,4 | 29,5 |
| io alia | 19,4 | 2,5 |

Montriĝas el la studo, ke eks-membroj ne distanciĝis de Esperanto. Oni klare vidas, ke oni konsideras Esperanton kiel ŝatokupon per si mem kaj ke laŭeble oni prizorgas kontaktojn kun eksterlandaj samideanoj. Sed, la interesiĝo pri societaj renkontiĝoj ege malsupreniras. Tamen oni ne neglektu la fakton, ke ankaŭ la unuaj membroj ne konsideras la kluban vivon plej grava. Ĉefe soleculoj, gefraŭloj kaj eventuale vidviĝintoj pleje interesiĝas pri tiaspeca socia kontakto.

Homoj forlasas la asocion pro specifaj tialoj. Gravas en tio la familiaj kaŭzoj, t.e. flegado de infanoj, profesia okupo, eventuale studado kaj ankaŭ tromaljuneco kaj malsaneco. Due povas malfaciligi okupiĝon pri Esperanto la domicilo de la interesitoj. En urboj oni pli facile trovas kontakton kun Esperantistoj ol en vilaĝoj.

Praktike oni povas serĉi en la membrolistoj, ĉu la eksmembroj loĝas ie dise en la lando aŭ ĉu ili povas havi familiajn malhelpaĵojn. La lasta punkto esploreblas pere de la aĝoj de la eksmembroj, kvankam pli precize per enketo mem.

Ĉiukaze, atentigendas ke eksuloj ĝenerale ankoraŭ interesiĝas pri Esperanto kaj ke ilia interesiĝo estas flegenda, kvankam oni ne tro esperu pri ilia fo[illegible]emo partopreni en societaj renkontiĝoj. Sekve oni ne tro esperu, ke la Esperanto-komunumo pligrandiĝos nur laŭ tiu vojo.

Prefere oni konsideru la lokajn grupojn kaj la regionan asocion kiel movadan bazon, kiu laŭpove ankaŭ prizorgas servojn. La servoj devas tuŝi la fenomenon, ke Esperanto estas ŝatokupo por multaj unuflanke (Esperantistoj estas legantoj) kaj ke ili volas eksterlandajn kontaktojn aliflanke.

Oni zorgu pri pli intensiva kontakto kun unuopuloj. La movado iru al ili kaj ne inverse. Oni ne provu allogi ilin. Fono de tiu ideo estas, ke eksmembroj, sed verŝajne ankaŭ la komencantoj ne interesiĝas tro pri integriĝo en movadaj grupoj sed pli interesiĝas pri unuopaj interkontaktoj. Tiu konstato validas,



kvankam multaj eksaj kaj ekaj membroj alte aprezas la internajn ideojn de Esperanto.

En kadrokursoj oni povas ellabori jenajn temojn :

1) Kiaj homoj estas allogataj per kiuj informiloj ? Ekzemple en vilaĝoj oni konstatas la grandan valoron de publikaj periloj : gazeto, radio, televido. En urboj pli gravas konatuloj, amikoj kaj parencoj. Ĝenerale la aniĝo dependas laŭ aĝo, sekso, profesio, klereco kaj lokiĝo. La teoria kurso estas evoluigo de la iama kadrokurso pri komunikado.

2. Esploro de rapidkursoj

3. Esploro de la gazetara servo

4. Esploro de la uzado de liberaj radio-elsendejoj

Per tio oni emfazas, ke la kadrokursoj devas havi praktikan celon, ili devas alporti rezultojn. La kadrokursoj ĉi-supraj rilatas informadon. Samtempe estu ellaborita la informado pri la praktikaj eluzeblecoj de Esperanto, unue tio koncernas legadon (ŝatokupo) kaj eksterlandajn kontaktojn.

La celo estas, ke interesitoj tiel restas anoj de asocioj sen ke ili malentuziasmiĝas pro ilia malebleco partopreni en la movada vivo.

Alia tereno, pli ĝenerala, povas esti la ellaborado de nuntempaj agadoj de aktivaj movadanoj.

5. Kadrokurso ĉirkaŭ la historio de la Esperanto-movado kaj pli specife la flandra

6. Kadrokurso ĉirkaŭ strategioj por la Esperanto-movado.

AS.

2. <u>LIBROSERVO FEL/FLEJA</u> (vd 7.2 de la antaŭa raporto)
   IT defendas la starpunktojn de FLEJA.
   Post ideinterŝanĝo ni venas al kontentiga solvo.

3. <u>DIVERSAĴOJ</u>

3.1. La buĝeto por 1985 estos pritraktata en la novembra kunsido.

3.2. La kongreso en Aalst havas pozitivan saldon.

3.3. Fest-kandeloj (kristnaskaj k.s.) estas denove haveblaj je po 100 aŭ 20 BF.

3.4. Je peto de pluraj partoprenintoj de la antaŭa, antaŭvidiĝas la organizo de nova balo venontjare.

Fino : 12.45 h.

JB

K L U B O  1 0 0  (daŭriga listo)

33. Chr. DECLERCK
34. M. NAGELS
35. R. de ROOVER (2-a fojo)
36. H. VAN HOOYERDONCK
37. A. CLAESEN
38. M. WILLEMS
39. L. VERMEIRE
40. L. DEMARE
41. L. LERNOUT
42. E. SPITAELS
43. R. STEENHOUT
44. F. VAN DOREN
45. G. DEBROUWERE
46. C. VANBIERVLIET

Kiel sciate, KLUBO 100 celas financi la jubilean programon.
Aliĝo eblas per unufoja pago de BF 1.000,- .

--------

Letero de nia prezidanto.

Karaj Geamikoj,

Sabate, la 6-an de oktobro, dudeko da klub- kaj kursgvidantoj eksperimentis per la metodo "ideopluvigo" °° , sub gvidado de S-ro Ray Gerard. Dum du horoj ni elspruĉis ideojn por fari el kurasanoj Esperantistojn. Post pezado de ili, ni konstatis ke la plej valoraj ideoj estis NE-novaj. Ĉu inda rezulto ?

Por mi, la sukceso troviĝis en la etoso. Ĝis nun, mi spertis la estraron de FEL, la Esperanto-Centron, la diversajn grupojn kaj la kursgvidantojn kiel aŭtonomajn ĉelojn en la Esperanto-movado. Pro tio, mi aparte ĝuis la momenton, kiam proksimume unuanime la ĉeestantoj kune decidis emfazi kelkajn punktojn, kiujn mi resumas jene :

1) sisteme flegi la rilatojn inter spertaj esperantistoj kaj kursanoj ;
2) sisteme plani kunlaboron inter la grupoj : la pli malgrandaj prefere vizitu la grandajn ;
3) strebi al internacieco
4) fari honestan informadon.

Precipe la lasta punkto ŝajnas esti rekomendo al la FEL-estraro. La fakto, ke grupestroj kune konsilas sian estraron kaj la Esperanto-centron estas ege pozitiva.



Se kreiĝas la sento, ke ni kune formas unu teamon, tiam nia laboro sendube fariĝos multe pli efika !

Via prezidanto
Ivo Durwael.

°° jen ankoraŭ kelkaj terminoj, proponitaj por la fama "brainstorm"
cerbo-premado, ideo-spruĉigo, cerbo-pristurmo, ideo-elsuĉo ...
Ĉu vi konas aŭ povas proponi ankoraŭ alian terminon, bonvole sciigi ĝin al ni.
Anticipan dankon.

----------

Rilate 'honesta informado', eble jen jam unu proponeto :

Unu el la rimarkoj de la ĉi supre nomita eksperimento, estis ke ekzemple en la flavaj paĝoj de ESPERANTO PANORAMA oni trovas la adresojn de kvanto da grupoj, kiuj fakte estas nur surpaperaj mencioj.
Plej bedaŭrinde en tio estas, ke certaj el tiuj "grupoj" eĉ mencias kunventagojn.

Normale nova esperantisto, kiu volas renkonti samideanojn, sin direktas al tiaj grupoj, post konsultado de ESPERANTO PANORAMA, kaj trovas neniun.

Mia propono estas do, ke ni forigu el niaj flavaj paĝoj, ne nepre tiujn grupojn, sed jes ke foriĝu la mencio pri kunvenoj k.s. La adreso mem ja povas servi kiel inform-adreso, kompreneble se la koncernulo konsentas pri tio.

Do, se tiu ĉi mia propono estas akceptebla, mi petas al ĉiuj grupestroj, ke ili esploru la flavajn paĝojn de ESPERANTO PANORAMA pri eventuala erara aŭ fanfarona = nevera indiko kaj sendu al nia Centro la korektajn menciojn.

Jen jam unua, eĉ se ne granda, korekto de ne-honesta informado.

Jen, do, ankaŭ jam unua rezulto de nia " cerbo ---- ".

Mi certas ke aliaj sekvos, kondiĉe ke ni plu-kunlaboru, kiel nia prezidanto proponas.

--------------

Ĉu vi sciis ... ? ... ke, pri  I T A / A T A

la Plena Analiza Gramatiko konsilas sekvi la regulon, proponitan de Raymons Schwartz, nome : "kiam vi povas aldoni 're kaj re' aŭ 'plu kaj plu' uzu -ata ; se vi povas aldoni "definitive", uzu -ita."

# IOM PRI PRAGMATISMO

Ne malofte aŭdiĝas demando, ĉu la scio de Esperanto donas praktikan utilon.

Antaŭ ol respondi necesas diri kelkajn vortojn pri la senco de la demando, kiun tre verŝajne ĉiu individuo rigardas el malsama vidpunkto. En la plej ĝenerala senco de la vorto ĉia ajn uzo de Esperanto por kia ajn formo de komunikado, ekde la plej ordinara konversacio ĝis interŝanĝo de pensoj sur scienca nivelo, signifas fakte praktikan utiligon de la lingvo. La alia ekstremo estas kompreni la praktikan utilecon nur el vidpunkto de pure materiaj gajnoj, esprimeblaj en monaj ekvivalentoj, kiujn prezentas la scio de la lingvo. Inter la plej simpla komunika rolo, unuflanke, kaj la „mona valoro" de la lingvoscio, aliflanke, troviĝas longa, seninterrompa ĉeno da ĉiaspecaj praktikaj aplikoj. De la personaj preferoj multe dependas, ĉu kaj ĝis kiu grado tiu aŭ alia aspekto de praktika utiligo estas aprezata.

„Pragmatismo", ofte tro unuflanke komprenata, en tiu ĉi kunteksto estas fakte nenio alia ol rigardado al la lingvo el vidpunkto de ĝia praktika valoro. Se tiel, pragmatismo por iu unuavice signifas gajni monon per Esperanto, ricevi turisman informon aŭ legi menuon en la Internacia Lingvo — kio ja sendube estas utila —, sed por alia ĝi povas antaŭ ĉio signifi la eblecon legi bonan originalaĵon, aŭ literaturan tradukon, aŭ fakan verkon. Eĉ propagandado de siaj propraj sociaj kaj politikaj idealoj, aŭ disvastigado de religiaj kredoj, estas fakte siaspeca pragmatismo. En tiu ĉi senco ankaŭ la utiligo de Esperanto por kulturaj celoj efektive egalas al praktika apliko de la lingvo por ĉiu klera, kultura homo.

### Kunligiteco kaj Interdependeco

En alia senco unueco en diverseco egalas al kunligiteco kaj interdependeco de unuopaj agadoj. Unuavice tio rilatas al la tri ĉefaj branĉoj: informado, instruado kaj praktikaj aplikoj. Vane oni faras eĉ la plej bonan informadon pri la Internacia Lingvo, se oni paralele ne prezentas taŭgajn eblecojn por lerni ĝin. Klopodoj instrui la lingvon en medio neinformita kaj sen antaŭpreparoj tre verŝajne ne donos rezulton. Lernado de Esperanto kiel celo al si mem, sen eblecoj de praktikaj aplikoj, apenaŭ havas sencon. Aliflanke, praktikaj aplikoj de la lingvo estas maleblaj, se ne ekzistas personoj, kiuj scias ĝin. Nur kunligiteco de la tri garantias realan kaj daŭran progreson. La samo koncernas ĉiun unuopan eron da aktivado interne de la tri grandaj branĉoj. Oni ne povas evoluigi kaj kreskigi la Esperanto-literaturon, se samtempe ne kreskas la nombro de personoj, kiuj scias la lingvon. Ne estas eble ampleksigi la sciencan kaj fakan verkaron, se ne troviĝas kompetentaj legantoj en la respektivaj sciencaj branĉoj kaj fakoj. Se oni ne volas ridindigi sin mem kaj la aferon, por kiu oni pledas, oni ne povas alparoli homojn surstrate en la Internacia Lingvo antaŭ ol ĝi estos tiel disvastiĝinta, ke la alparolitoj konas ĝin, aŭ almenaŭ ke ekzistas minimume verŝajno pri tio. Unu el la kaŭzoj, pro kiuj estas utile porti ĉiam la Esperanto-insignon (ne multajn, sed unusolan), estas indiki sian lingvoscion kaj tiel helpi al tiaspeca plej ordinara praktika uzo. Oni povus ankoraŭ longe daŭrigi la vicigon de ekzemploj por montri la kunligitecon kaj interdependecon de ĉiuj aspektoj, aplikoj kaj agadoj. Tamen, ankaŭ tiu simpla vero ne ĉiam estas same simple komprenigebla.

el "ESPERANTO EN PERSPEKTIVO"